

En ripoz-urbo Soĉi estas siaspeca simbolo de paco, amikeco kaj frateco inter popoloj, unika monumento de sciencaj atingoj. Branĉoj de la Arbo kreskis el burĝonoj, greftitaj per manoj de homoj el diversaj landoj, nacioj kaj profesioj. Tiu ĉi montrilo nepre kondukas vin al la Arbo.



La Arbo de Amikeco havas interesan historion. La sciencisto-ĝardenisto Fjodor Zorin plantis malgrandan arbeton de sovaĝa citrono. Por ricevi novajn frostorezistajn specojn de citrusoj la selektisto greftis al ĝi 45 specojn (ekzemple, japanajn mandarenojn, italajn citronojn, amerikajn grapfruktojn, hispanajn oranĝojn k.t.p)



Tiel ĝi aspektas, la fama eksperimenta planto, kiu allogas vizitantojn per ties neordinara aspekto.



La fama soveta nord- esploristo Otto Schmidt, vizitinte la ĝardenon en la jaro 1940 admiris la sesjaran arbon, sur kiu kreskis fruktoj de diversaj citrusaj specoj, kaj faris grefton por memoro. Ĝi

iĝis la unua branĉo sur la estonta Arbo de Amikeco. En la jaro 1957 vjetnemiaj kuracistoj proponis nomi la citrusan arbo-ĝardenon Arbo de Amikeco. Reprezentantoj de 167 landoj faris pli ol 600 greftojn en la krono de la Arbo.

Apud la Arbo de Amikeco kreskas ankoraŭ sesdeko da junaj arboj, sur kies branĉoj oni ankaŭ faras greftojn je honoro de paco kaj amikeco.



Sur ĉiu greftita branĉeto estas ŝildeto kun dato kaj nomo de greftinto. Tie estas ankaŭ nomoj de esperantistoj A.Masenko, V.Bespalov k. a.



En la jaro 1981 en la ĝardeno estis malfermita muzeo. En la muzeo estas eksponataj plej interesaj specoj, plej novaj teknologioj de la kulturbredado.



En majo 1965 laborantoj de Tolstoj-muzeo en Jasnaja Poljana sendis grundon el la tombo de la granda rusa verkisto al la Arbo de Amikeco. Poste aperis aliaj donacoj.



Novaj specoj de fruktaj kaj floraj kulturoj, kreitaj de sciencistoj, ornamas ĝardenon de la subtropika zono de Nigramara bordo.



Ĉiuj vizitantoj admiras kaj ĝuas ĝardenan belecon.



Dum Esperanto-renkontiĝoj TILĖ partoprenantoj tradicie vizitas la Arbon de Amikeco kaj tiun belegan ĝardenon. Estu kun ni!

Aŭtoroj: Vladimir Bepalov, Margarita Karceva



*La Arbo de Amikeco*

*Uljanovska Esperanto-klubo*

*Esperanto-klubo "Laro", Soĉi*

